

William Blake,  
La tigro

*tradukita de William Auld*

Tigro, tigro, brile brula  
En arbaro nokt-obskura,  
Forĝis kia man' eterna  
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo  
Ardis via okulhelo?  
Kia lin flugil' subtenis?  
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompeno.  
Por vi tordiĝis kortendeno?  
Kaj kiam pulsas batoj koraĵ,  
Kiaj pied' kaj mano gloraĵ?

Kia martelo? Ĉeno kia?  
Kia forn' por cerbo via?  
Riskis kia fort' kolosa  
Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malmarmis  
Kaj sur la ĉielon larmis,  
Ĉu la verko al li karis?  
Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

Tigro, tigro, brile brula  
En arbaro nokt-obskura,  
Forĝus kia man' eterna  
Vin je simetri' konsterna?

...

William Blake,  
Der Tiger

*tradukita de Walter A. Aue*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

William Blake,  
The Tyger

Tyger Tyger, burning bright,  
In the forests of the night;  
What immortal hand or eye,  
Could frame thy fearful symmetry?

In what distant deeps or skies  
Burnt the fire of thine eyes?  
On what wings dare he aspire?  
What the hand, dare sieze the fire?

And what shoulder and what art,  
Could twist the sinews of thy heart?  
And when thy heart began to beat,  
What dread hand? and what dread feet?

What the hammer? What the chain,  
In what furnace was thy brain?  
What the anvil? What dread grasp,  
Dare its deadly terrors clasp!

When the stars threw down their spears  
And water'd heaven with their tears:  
Did he smile his work to see?  
Did he who made the Lamb make thee?

Tyger Tyger, burning bright,  
In the forests of the night;  
What immortal hand or eye,  
Dare frame thy fearful symmetry?

...

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger" de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 - †1827-08-12) en Esperanton de WILLIAM AULD (\*1924-11-06 - †2006-09-11).*

*Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)*

*Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html>.*

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger" de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 - †1827-08-12) en la Germanan de Walter A. Aue.*

*Arg-1048-2126 (2014-06-08 19:55:12)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en <http://myweb.dal.ca/waue/Trans/Blake-Tiger.html>.*

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 - †1827-08-12).*

*Arg-1048-2125 (2014-06-08 19:43:08)*

*Pri la poeto vidi la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/William\\_Blake](http://eo.wikipedia.org/wiki/William_Blake).*